*************************************************************************************

**INSTRU-CIRKULERO 2014/decembro**

Neregula informilo pri E-instruado, novaĵoj, projektoj, renkontiĝoj

*************************************************************************************

Karaj Gekolegoj,

proksimiĝas la jarfino, okazo por retrorigardo, resumo de agadoj en 2014. Mi dankas al ĉiuj membroj de AGEI kaj aliaj gekolegoj, geamikoj la kunlaboron, subtenon kaj esperas je tio ankaŭ en la nova jaro.

**Grava alvoko** sur aparta kolora folio aldone al tiu cirkulero: bv. legi kaj laŭeble helpi al ni realigi tiun projekton. Ĝi kreos ankaŭ pli bonajn servojn por instruado, studado, informado pri Esperanto. Dankon!

**I. Instruado en lernejoj:**

Mi ricevis tre malmultajn informojn pri lerneja instruado de Esperanto en la lernojaro 2014/2015. Mi esperas, ke kelkaj gekolegoj daŭre instruas en siaj lernejoj (ekz. Jutta Chikato en Buxtehude, Norbert Bludau en Korbach) kaj petas ĉiujn sendi novaĵojn kaj al mi kaj al http://edukado.net/kursejo
ĉu estas daŭrigo de iu lerneja kurso, fakrondo, ĉu estas ĵus komencita instruado en iu ajn formo.

Bonvolu registri vian
- lernejan aŭ
- eksterlernejan/movadan kurson kaj atentigu viajn gekolegojn, geamikojn pri tio, se vi scias, ke ili gvidas kurson.

1. Brombachtal: estas ĝojige, ke en la bazlernejo Andreas Emmerich antaŭ nelonge komencis instrui Esperanton al malgranda lerneja grupo. Sukcesojn!

Mi ĝojas ankaŭ pro tio, ke mi povis plenumi lian peton kaj sendi, pruntedoni al li kelkajn lernmaterialojn, uzeblajn instruhelpilojn por tiu aĝgrupo.
Jen unu el la servoj de Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg. Ni volonte helpas per konsiloj kaj materialoj el la speciala pedagogia-metodika fakkolektaĵo de la ICH-biblioteko.

2. Herzberg am Harz: mi daŭre ofertas lernejajn lecionojn en ĉiuj lernejtipoj:
2.1.baza lernejo Nicolai: Esperanton elektis 6 infanoj el la 1-4 klasoj. La leciono daŭras 60 minutojn unu foje semajne, en ĵaŭdo inter 15:00-16:00. Ni ricevis klasĉambron kun granda korktabulo, kie ni povas pendigi niajn ’produktojn’: desegnaĵojn, taskfoliojn, kolorigitajn bildojn kaj manlaboraĵojn. Alia granda korktabulo donas eblon aperigi niajn verkojn en la ŝtuparejo, kie ĉiuj lernantoj de la lernejo povas vidi, legi ion Esperanto.
Esperanto estas inter la libere elekteblaj posttagmezaj fakrondoj en la t.n. tuttaga lerneja programo, sekve instruado pagita laŭ oficiala honorario.

2.2. meza lernejo (Oberschule): mi ofertas kurson unu foje semajne, 60 minutojn. Kelkaj partoprenantoj de la fakrondo estas jam spertaj, kelkfoje partoprenis ekz. en la ĝemelurba somera renkontiĝo SALO. Espereble 1-2 lernantoj povos trapasi KER-ekzamenon en B1 nivelo.

2.3. gimnazio: post la fino de trilanda Comenius-projekto kelkaj lernantoj daŭrigas la lernadon de Esperanto kaj plu funkcias la fakrondo 60 minutojn longe, unu foje semajne.

3. Winterberg: partoprenintoj en kvinlanda Comenius-projekto daŭrigas Esperanto-lernadon sub gvido de Christof Krick.

Ni esperas, ke en 2015 kelkaj lernantoj povos spertiĝi en iu internacia junulara renkontiĝo ekz. Infana Kongreseto, PSI, TEJO-kongreso. Sponsoroj estas bonvenaj!

**II. Instruado eksterlerneja**

Laŭ mia scio en pluraj Esperanto-kluboj okazadas kursoj, instruado al studentoj (Sebastian Kirf en Emden) kaj al plenkreskuloj (Heinz Sprick en Hameln, Peggy Ley en Hamburg, Helga Plötner en Gräfenhainichen, Judith Meyer en Berlin, ktp.). Pardonu, se mi ne mencias ĉiujn, sed mi havas malmultajn informojn el kelkaj regionoj. Estus bone, se ankaŭ tiuj (kaj aliaj) kursoj estus registritaj en la koncerna paĝo de edukado.net (detalojn vidu pli supre).

## III. Popolaltlernejoj (VHS)

Mi aŭdis pri diverslokaj streboj starigi popolaltlernejajn Esperanto-kursojn kaj ĝojas pri tio, ĉar eĉ se ne ĉiam ekestos kurso pro malmultaj aliĝintoj, tamen la aperintaj kursalvokoj estas bonaj informiloj, varbiloj pri Esperanto. Mi provadas kolekti tiujn alvokojn ĉe http://agei.esperanto-urbo.de/page.php?pid=97868652, ke ili servu kiel modeloj por novaj kursalvokoj.

Mi mem ofertis kelkajn VHS rapidkursojn. La programkajeroj estas haveblaj, dissenditaj en la tuta regiono. Novaĵo estas, ke ekde aŭtuno la Popolaltlernejo Osterode kunfandiĝis kun Göttingen kaj la oferto-listo atingas multe pli da homoj.
KVHS en Northeim mem petis, ke mi ofertu denove Esperanto-kurson. Jen la sekvaj:
17.02.2015 en KVHS Northeim, 20-21.02.2015 en Osterode am Harz.

**Bildungsurlaub** (agnoskita klerigcela labor-forpermeso): INTENSA KURSO tutsemajna – Esperanto von Anfang an. Ĝi taŭgas por lernemuloj en ĉiuj niveloj, ja ni povos dividi la grupon poste laŭ bezono kaj ni ofertas ankaŭ instrukapabligan metodikan-didaktikan trejnadon kun observeblo kaj analizado de diversnivelaj lecionoj, traktado pri kursgvidado.

**09.-13.03.2015** 8:30-16:30 en Osterode am Harz (aŭ laŭ interkonsento en Herzberg am Harz, en la Esperanto-Centro. Favoran tranokteblon ni povos trovi por aliĝintoj en Herzberg).

Aliĝeblo al ĉiuj interesitoj! Gravas, ke estu almenaŭ 7 aliĝintoj (4 interesiĝantoj jam estas, kelkaj eĉ el eksterlando), do mi petas vin ĉiujn, bv. informi tiun lerneblon en via ĉirkaŭaĵo, evt. vi mem pripensu partopreni la intensan kurson kaj perfektiĝi! Petu informojn pri rabato!

Ĝis nun ni jam gvidis dufoje tian intensan klerigkurson kaj povas raporti pri bona sukceso, agrabla etoso, granda lernemo kaj rapida evoluo. Venu, vidu, spertu!

Vi trovas resumajn informojn pri tiu Esperanto-kursoferto en 2015 ankaŭ ĉe
http://agei.esperanto-urbo.de/gallery.php?gid=57498545

## IV. Faka pluklerigado, instrukapabliga trejnado

Vidu la Bildungsurlaub-alvokon pli supre. Krome Germana Esperanto-Centro, Filio de GEA por Klerigado kaj Kulturo ankaŭ en 2015 ofertos siajn trejnsesiojn en diversaj temoj, ekz.:gramatiko, lingvistiko, interlingvistiko, historio, kulturo de Esperanto, varbado, movadaj konoj, metodiko, ktp.
http://ic-herzberg.de/page.php?pid=81093452

La tabelo enhavas la gravajn kurs- kaj klerigofertojn de GEC/ICH kaj AGEI en 2015. Aliĝu por perfektiĝi aŭ/kaj akiri atestilon, fariĝu kursestro, movada fakulo, Esperanto-instruanto!

| | | |
|---|---|---|
| Februaro 13-15 | 68a GEA-Klerigsesio, ekz. pri literaturo, muziko | ICH, Herzberg |
| **Marto 09-13** | **Esperanto-KVHS-Bildungsurlaub: intensa kursaro kaj metodika-didaktika trejnado** | KVHS, Osterode |
| Marto 13-15 | Intensa semajnfina Esperanto-kursaro A1-B2 niveloj | ICH, Herzberg |
| Majo 15-17 | 69a GEA-Klerigsesio | ICH, Herzberg |
| Majo 25 | Interkultura Muzik-Festivalo (per EU Grundtvig-Projekto) | Herzberg |
| Majo 30 | Tutmonda Ekzamentago | Herzberg |
| Aŭgusto 01-08 | Internacia Kultur-Turisma-Semajno (IKS) | Herzberg |
| Septembro 30-<br>Oktobro 04 | Pedagogiaj Tagoj (TORPEDO 10)<br>70a GEA-Klerigsesio | Herzberg |
| Decembro 11-13 | 71a GEA-Klerigsesio | ICH, Herzberg |

Aliĝu ĉe: esperanto-zentrum@web.de, detalojn legu ĉe: http://ic-herzberg.de/page.php?pid=81093452

**V. Somera Esperanto-Perfektigo (SEP) kaj metodika trejnado**

Ĝi okazis en la dua duono de julio 2014, estis du-semajna intensa lingvokursaro de Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg, komuna somerumado de lernemuloj, perfektiĝemuloj kaj instruemuloj. La programo enhavis antaŭtagmezajn instruhorojn en du grupoj sub gvido de Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar, kiuj zorgis ankaŭ pri la varia programo en la posttagmezoj: urborigardado, promenado, muzeaj vizitoj, ekskursoj, ktp. - sed kompreneble ĉio kun Esperanto-ekzercado. La vesperoj bone taŭgis por diskutado, rakontado persona kaj primovada, prezentadoj pri Esperanto-eventoj, kantado, lingvaj kaj societaj ludoj, legado, aŭskultado de muziko kaj filmrigardado. La riĉa biblioteko de Interkultura Centro Herzberg estis je dispono por konatiĝi kun lernmaterialoj, literaturaj kaj sciencaj verkoj, didaktikaj helpiloj por instruado.
La intensa lernado estis tre efika, ni certe ripetos la eventon en la sekvaj jaroj. Detaloj, fotoalbumo: http://esperanto-urbo.de/blog.php?blog_id=55370099

**VI. KER-ekzamentagoj en 2015**

En 2015 ne okazos unu granda tutmonda ekzamentago, sed estos ofertataj tri malpli grandaj sesioj. Ekzameniĝantoj povos elekti ekzamentagon, en kiu ie en la mondo jam certe okazos loka ekzameno kaj al kiuj eventoj povas aliĝi aliaj ekzamenlokoj.
Bonvolu legi la detalojn ĉe la paĝo: http://edukado.net/novajhoj?id=501

En Germanio ni planas aliĝi al la internacia ekzamentago en la 30a de majo 2015 kaj oferti ekzameneblon en Herzberg. Interesiĝantoj bv. anonci sin ĉe mi, Zsófia Kóródy.

**VII. Torpedo 9**

En 2014 denove okazis Torpedo, la jam Tradicia Oktobra Renkontiĝo Pedagogia post unujara paŭzo, ĉar en 2013 en Germanio okazis ILEI-konferenco kaj AGEI decidis ne aparte organizi aŭtunajn pedagogiajn tagojn. La evento fariĝis vere internacia, la programo estis tre varia kaj la prelegoj tre interesaj, altnivelaj kaj taŭgaj por la ĉefa celgrupo, trejnotoj el Pollando, kiuj alvenis dank' al subvencio per eŭropa Erasmus+ projekto. La detalan programon bv. vidi ĉi tie
http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=80042088
Ni ĝojas, ke ni povas helpi la instrukapabligadon de tiuj geamikoj el Pollando, ja ili pli kaj pli multe aktivas en sia lando, ofertante Esperanto-kursojn, renkontiĝojn enkadre de la Universitato de la Tria Aĝo kaj en kelkaj lernejoj.
T.n. postseminarion, fakan konsultiĝon ni organizis por la gvidantoj, instruistoj de la Somera Arbara Lernejo (SALO, la kunferiumado de gelernantoj el Herzberg kaj Góra). Estis bona tempo organizi tion dum Torpedo, ĉar la evento kun fakprelegoj, diskutoj, spertinterŝanĝo pri instruado estis ankaŭ por ili bona plukleriĝeblo.
Dum tiuj tagoj konsultadis ankaŭ la gvidantoj de la internacia Grundtvig-projekto pri multkultureco kaj multlingvismo en Eŭropo kun partopreno de reprezentantoj el Germanio, Hungario, Nederlando kaj Pollando. Pro tio ni havis la bonŝancon oferti al la Torpedo-partoprenantoj prelegojn ekz. de Katalin Kovats de edukado.net kaj László Szilvási, gvidanto de la tre sukcesa Esperanto-lingvolernejo en Hungario.
La delegitojn de diversaj landoj akceptis urbestro Gerhard Walter kaj ni invitis ankaŭ Rüdiger Brakel, la eks-direktoron de la regiona Popolaltlernejo, kiu klarigis la germanan sistemon de plenkreskula klerigado kaj respondis la multajn demandojn de la eksterlandaj gastoj.
Resumo pri la evento kun fotoj: http://esperanto-urbo.de/blog.php?blog_id=57321792

**VIII. Internaciaj projektoj**

1. Por la junularo: Du eŭropaj Comenius-projektoj finiĝis en aŭtuno 2014. En unu partoprenis gejunuloj sub gvido de Christof Krick el Winterberg, en la alia gelernantoj de la Ernst-Moritz-Arndt Gimnazio en Herzberg. Pri tiu dujara projekto legu detalojn en kvar lingvoj: en la germana, hungara, itala kaj en Esperanto, vidu fotojn, filmojn ĉi tie: http://comenius.esperanto-urbo.de/

2. Por plenkreskuloj:
2.1. la eŭropa Grundtvig-projekto kun la temo 'Kiel instrui pri multkultureco de Eŭropo' bone evoluas kun partopreno de Kultura Esperanto-Asocio (HU), Fondaĵo edukado.net (NL),Germana Esperanto-Centro – Filio de GEA por Klerigado kaj Kulturo (DE) kaj Interkultura Eduka Centro (PL). La celo de

la renkontiĝo en Hungario meze de septembro estis lerni pri popolaj tradicioj, kutimoj kaj spertiĝi en kulturaj eventoj. La 4-taga seminario estis jam la tria kunveno de la projektpartneroj, al kiu aldoniĝis la kunsido de la projektgvidantoj dum Torpedo 9 en Herzberg (legu pli supre).
La lasta renkontiĝo okazos en Herzberg, inter ĉ. 24-27 majo 2015 kun seminario kaj multaj kulturaj eventoj.

**2.2. Erasmus+:** de 2014 sub tiu nomo funkcias la eŭropaj projektoj enkadre de la 'Dumviva Lernado Programo'. Germana Esperanto-Centro (GEC) partoprenas en unu, kiu celas la plibonigon, modernigon de sia klerigsistemo, ebligonte ankaŭ perretan studadon kaj virtualan konsultadon. Kunlaborantoj kaj trejnotoj de GEC por tiu sistemo partoprenis fakajn seminariojn ekz. en Italio dum la Itala Kongreso, en Poznan dum la Interlingvistikaj Studoj kaj en Modra Harmonia dum KAEST. En ĉiuj eksterlandaj trejnsesioj estis bona ebleco spertiĝi kaj engaĝi gekolegojn, studemulojn por estonta kunlaboro.

## IX. ILEI-konferencoj

Pri la 47-a konferenco en 2014 en Montevideo vi jam povis legi raportojn ekz. en IPR. La 48-a konferenco inter 17-25 julio 2015 okazos en Oostende, Belgio.
Laŭ decido de la ILEI-estraro la 49-a Konferenco de ILEI en la jaro 2016 okazos en la Filologia Fakultato de la Universitato en Nyíregyháza, Hungario, verŝajne post UK en Nitra, Slovakio.

Inter 13-16 majo 2015 okazos la Tria Tutmonda Kolokvo pri instruado de Esperanto en la kantono Neuchâtel, Svislando. Informoj ĉe www.ilei-mondo.info

## X. Instruhelpiloj, filmoj, novaĵoj

1. Volonte mi plusendas informojn pri instruhelpiloj por infanoj:
Esperantisto el Sevilo, Pablo, pretigadas serion da filmetoj por infanetoj, kun mallongaj simplaj kantoj, langorompiloj, k.s. Vidu la ĝisnunan laboron:
https://www.youtube.com/watch?v=LkHrFq3-h7Q&list=PLLVPCifOPtDw_V-rNJgEAWY8tKEQi4nGk
Por vidi nur la langrompilon:
https://www.youtube.com/watch?v=lVB-pfJZ1o8&list=PLLVPCifOPtDy37HT9R7gMA1dliPG4ZbXG

2. 7-minuta filmeto en la angla lingvo kun bazaj informoj pri Esperanto, la lingvo, gramatiko:
http://www.youtube.com/watch?v=Vp_pDOJZOdg&feature=share

3. Duolingo dum nur tri jaroj fariĝis unu el la gvidaj lingvolernaj retejoj de la mondo - cetere la lernado tie estas senkosta. Ekde septembro 2014 estas preparata ankaŭ Esperanto-kurso. La unua versio de tiu kurso instruas pere de la angla. Detalojn vidu ĉe http://incubator.duolingo.com/, kie Esperanto menciiĝas en la sekcio "Incubation Phase 1, Courses not yet released". Eblas jam nun aliĝi por ricevi informojn pri la Esperanto-kurso, ĉe https://www.duolingo.com/course/eo/en/Learn-Esperanto-Online. Ene de malmultaj tagoj kolektiĝis pli ol 2000 lernemuloj tie.

4. Novaj lernmaterialoj, ekzercoj, Esperanto-gramatiko aperis sur la paĝaro www.lingolia.com. Vi trovas tie ankaŭ lernhelpan kalendaron por 2015.

Dankon pro via helpemo, informado, aktivado por instruado.

Dezirante al ĉiuj AGEI-membroj, gekolegoj, geamikoj agrablajn jarfinajn festotagojn, bonan sanon, sukcesojn, prosperon en 2015,

kun multaj salutoj,

Zsófia Kóródy
prezidanto de AGEI